Praha-ek-1954-18

No 18 Kromnumero /Oktobro 1954/. Aperas laŭbezone.

ANTAŬ
SPEGULO

Klare hela bela sun', el la lito logas.
Aĥ, spegul', spegul', ĉu vi ne mensogas?
Diru vi, sklavin', ĉu spegulo pravas?
Vere, mi ravas!
Iom palas mi. . . La ruĝilo? - Dankon. . .
Miru, stultulin', mi toleros mankon.
Daŭre trudas sin tragedia sceno -
en la areno.
Ne tro da parfum', ĝi por ĝojo taŭgis.
Longe luktis li. Oni rre aplaŭdis. . .
Poste - eĥ, renvers'. Li fatalon spite
skermis vundite. . .
Kiel kombi min? Estas ja egale. . .
Ĉar funebras mi, do spiralu fale
mia nigra har' . . . Tia vir' kuraĝa,
bela, junaĝa!
Lasu sen ornam'. Afliktita koro.
Mortis, mortis li, la giadiatoro.
Sed mi vidas min' kvazaŭ tra nebulo
en la spegulo. . .
Eli Urbanova

Ĉi supre ni represas originalan poemon, kiu dum la nunjara Belarta konkurso de UEA en Harlemo ricevis la unuan premion.

## TUTŜTATA KUNVENO EN OTROKOVICE
19 5 4.

Ĉirkaŭ 140 esperantistoj el ĉiuj anguloj de ĈSR kunvenis la 11. -12. de septembro en Otrokovico, kie loka Esp. rondeto aranĝis tutŝtatan konferencon. Sabatvespeto estis dediĉita al esp. literaturo. Pri sia originala poezio prelegis kun deklamo la ĉijara internacia premiitino Eli Urbanová el Praha. Ŝia prezentado estis atentostreĉe aŭskultata. Specimcnoj el ŝia plej nova verkado estis laŭmerite aplaŭdataj.
F. Omelka, la spirita gvidanto kaj organizinto de la programo pleninterese rakontis pri la genezo de sia famiĝinta libro "Stafeto", tradukita jam en kvin fremdajn lingvojn.

Finon de la vespero kronis verve prozentita parolo de s. F. Bláha pri sportoj kaj travivaĵoj en Esperantujo.
Dimanĉe ni aŭdis bonegan prelegon de s. Dro Pumpr el Praha pri la majstra traduko de la "Bapo de Sta Vladimiro". La riĉenhava kaj tre instrua prelego estis vera ĝuo por

ĉiu amanto de nia traduka poezio.
Pri organizo de MEM /Mondpaca Esperantista Movado/ prelegis s. Reizer el Plzeň. Pri punktoj de proponita rezolucio oni diskutis posttagmeze en klubejo, kie la kunvenintoj antaŭ la disiĝo ĝuis kelkajn lastajn horojn en freŝaera naturo.
Interesaj estis referatoj do s. Rudolf el Olomouc pri la kunlaboro de esperantistoj kun loka Porpaca komitato kaj de reprezentinto do Junularo el Ostrava s. Kuzník, kiu petis pri morala subteno de junulara poresperanta agado en nia lando. "La spertuloj estu instruistoj al nia juna generacio, ili helpu por konsiloj kaj spertoj fondi novajn grupojn kaj varbi junajn homojn por nia movado", diris fine s. Kuzník. Lia parolado estis varme aplaŭdata.
La tre sukccsinta programo estis finita per ĉeĥa deklamo de kortuŝe verkita poemo "Milujeme svou českou zem", kiun modele prezentis s. Kříž kun fortepiana akompano. Komuna fotografado kaj tagmanĝo finis la kunvenon.
Al la neĉeestinta pioniro s. Th. Čejka en Bystřice p. Host. estis sendita letera saluto de la kongresanoj. Faba.

En la pasinta 17a numero ni enpresis erare la datojn de niaj kunvenoj en oktobro. Memoru afable, ke la klubaj kunvenoj laŭ la publikigitaj programoj estas ĉiumerkrede /ne do marde, kio estis anoncite prese/ en Praha XII. , Ve Smečkách 26 je la 20a horo. Junularo kunvenas samtage kaj samloke je la 19a.

Niaj mortintoj.
Laŭ Heroldo No 12 ni ekscias, ke la 30an de julio ŝarĝaŭtomobilo mortigis Doktorinon WANDA ZAMEMHOF. Ŝi estis kvazaŭ viva legendo pri la kreinto de Esperanto, liganta la forpasintan epokon de nia movado kun la nuna tempo. La morto estas granda perdo por la tutmonda Esperanto-movado!
Laŭ la sciigo de la poŝto sur la resendita koverto kun nia Bulteno no 17 mortis ĉeĥa pioniro de nia movado Ing. Leopold Berger en Potŝtejn. Ĉiu esperantisto konas nome lian antaŭmilitan senlacan laboron en nia movado. Preciza informo ankoraŭ ne atingis nin. Nia klubo perdas unu el siaj plej oferemaj anoj. Al la familianoj ni esprimas plej sinceran dolorkunsenton!

MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO */MEM/* estis fondita pasintan jaron en St. Pölten-Aŭstrio. Kiel unuan prezidanton oni elektis s. Rudolf Burda el Plzeň. Pri tio ni informis nian membraron dum la kunveno la 18an de novembro 1953.
En nia Bulteno ni tiun informon ne ripetis. K-do Burda nun tre koleras kontraŭ ni pro tio kaj atakas nin en sia Pacdefendanto. Li ofendas nin deklarante nin "neŭtralaj" inter paco kaj milito, mem metante la vorton neŭtraleco inter citilojn, por ke ĝi ricevu alian signifon kaj por ke ni estu ia dubo pri tiu falsa akuzo lia dekstra mano-k-do Reiser, kiu reprezentis lin dum la tutŝtata kunveno en Otrokovice ripetis la samon ĉeĥe! Ni vere tre bedaŭras, ke la ĉefuloj de pacdefendantaro tiel ne pace kondutis kontraŭ ni. Nek riproĉojn, nek atakon ni meritis! Ni nur klarigas:NI NE HAVAS GAZETON! La Bulteno estas vere nur tre modesta informilo. Ĝi havas multajn mankojn. Tion ni plene konscias. La ĉefa manko estas, ke nia Bulteno aperas sur nuraj du paĝoj, kaj ke

ni kutime unualoke klopodas en ĝi publikigi tion, pri kio ni ne plu tru trovis tempon paroli dum niaj mallongaj merkredaj kunvenoj. Ni vere ne publikigis TRE multon.

Komunisté pro Esperanto. Při anketě pořádané v Itálii vyslovili se rozhodně pro Espcranto dva komunističtí členové italské sněmovny a organisacc partizánů-komunistů. Podobně prohlášení vydala i místní organisace Komunistické strany Itálie v Belluno.

Por ebligi pluan aperadon de nia Bulteno donacis al ni ciklostilan paperon: Strumínský-Šumbark kaj Svačina-Lanžhot, kiu sendis jam la kvaran paketon! Egan dankon!-Ne havinte paperon mone subtenis niajn klopodojn:Stachová-Praha 6,-, PhMg Jordán-Ružomberok 6,-, Forman-Praha 6,-, Ungrová-Neratovice 20,-, Jandík-Náklo-8,-, Dro Mohapl-Olomouc 10,-, Biss-Praha 6,-, Faltejsek-Třebechovice p/0 10,-, Konopová-Praha 12, Zedek-Praha 10,-, Zemek-Rumburk 6,-, Vyhnal Praha 6, Tyle-Doksy 15,- Anna kaj Alico Fryšovy Praha 18,-, Ing. Řebíček-Havl. Brod 12,- Inĝ. Krajíc-Č. Budějovice 10,-, MUDr Vaněk-Nová Role 14,-, A. Strejc - Praha 6,-, Landsmann - Praha 6,-, Ryant-Praha 6,-, Dr. Rathay-Praha 11,-.
Koran dankon al ĉiuj subtenintoj!

PRESISTON /grafikiston, tipografiston/en ĈSR, spertan esperantiston, serĉas Bobel Sörensen, Fortuna, Kaalunsvej 5, FARUM, Danmark por korespondado pri fakaj demandoj. S. Sörensen bezonas novaĵojn pri vivo kaj laboro de preslaboristoj en nia lando.
ESPERANTA JUNULARA GRUPO EN OSTRAVA aranĝos por siaj kursanoj la 8an de decembro 1954 letervesperon. Skribu al Zdeněk Škrňa, Dvořákova 7, Ostrava I.
Deziras korespondi: S-o Takasi Fuji, Hiroŝima universitato, HARA, Toma ri, Tottori Piy, Japanujo

---

Proksima numero aperos komence de novembro. Eldonkvanto 1000 ekzempleroj
Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.